

ESPERO KATOLIKA

Oficiala monata organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.), fondita de Abbe Richardson en 1910 en Parizo

Ĉefredaktoro A.F. Leideritz Vechtstraat 5 Amsterdam Z Nederlando
 Kunlaborantoj d-ro E.J. Görlich (Aŭstrujo), Robert Ernst sac. (Belgujo)
 Ludwig Thalmaier sac. (Germanujo), J. Vernoux sac. (Francujo), Eusebio
 Maynar (Hispanujo), Prof. H.G. Wannemakers S.J. (Indonezio) G. Eller-
 man kaj d-ro W.J.A. Manders (Nederlando), d-ro W. Solzbacher (Usono).

Ĝenerala sekretario-kasisto de I.K.U.E. L.G.C. de Jong. Adreso: Espero
 Katolika, Vleuten (Utrecht), Nederlando. Poŝtkonto: 252792.

LETERO DE LA PREZIDANTO

1952

La sonoriloj gaje diskonigis la Kristnaskan feston kiel eĥoj de la anĝela kanto antaŭ preskaŭ dumil jaroj 'Gloro al Dio en la plejalto, kaj paco al la homoj bonvolaj'.

Paco!! Ne la pacon ili deziras kiun nuntempe la registaroj klopodas sekurigi per kanonoj tankoj kaj bomboj. Ne la pacon sigelitan per surpaperaj traktatoj sed pacon, bazitan sur bonvolo kaj amo.

Esperanto estas potenca ilo por kunfratigi la homaron. Fakte la homaro jam estas kunfrataro, estante ja Dio nia komuna Patro, per kiuni estas kaj vivas. Se ĉiuj homoj eĉ se ĉiu katoliko konscius tion, ili sin sentus pli proksimaj kaj Esperanto nur bezonus plifaciligi tiun komunecon.

Jen do nia ĉefa tasko: konduki la homaron al Kristo la Reĝo. Per Esperanto ni konigu nian komunan ĉielan Patron.

Kion al ni instruas la pasintaj jaroj? Tre multe.

IKUE kaj ĝia estraro realigis multajn iniciativojn; ni nur parolu pri la ĉefaj.

1. Ni ellaboris novajn kaj modernajn statutojn adaptitajn al niaj tempo kaj cirkonstancoj.
2. Ni faris kontrakton kun la UEA kaj se eble en la estonteco, ni kune kongresos; tio dependos de la sintenado de UEA.
3. Ni pligrandigis la estraron kiu nun etendiĝas ĝis en Usono. Ni kore bonvenigas en la estrara familio s-ron d-ron Solzbacher kaj pastron d-ron Pausbach.
4. Ni sukcesis akiri helpantojn por la redaktado de nia organo. Ni kore dankas ilin pro tiu multvalora helpo. Ni nur esperu ke tiuj bonvolemaj amikoj daŭre kaj regule kunhelpu por ke nia gazeto iĝu pli kaj pli interesa.

Por la estonteco ni planas membrokartojn por ĉiuj legantoj de EK, ĉar ili samtempe estas membroj de IKUE. La realigo de tiu deziro estas en la manoj de la legantoj. Ni nur povas efektiviigi tiun planon se la abonantaro sufiĉe kreskas.

Dum la Internacia Eŭkaristia Kongreso en Barcelona fine de majo 1952 ni intencas organizi IKUE-kunvenon en la kadro de la tutmonda Eŭkaristia kongreso. Pro tio ne estos IKUE-kongreso en la nuna jaro 1952.

Denove jam forflugis kaj apartenas al eterno la jaro 1951.

Nova jaro kiel blankfolia libro aperas antaŭ ni en ĝi ni skribos novajn faktojn, novajn dezirojn, realigojn kaj novajn sukcesojn. Se ni en la ĵus komenca ĝinta jaro agos laŭ tiuj planoj kaj deziroj ni ricevos sendube la abundan benon de Dio. En tiu senco ni, kiel prezidanto de IKUE, tutkore deziras al ĉiuj Dibenitan pacoplenan novjaron.

Overpelt (Belgujo),
Januaro 1952.

A. J. Beckers, sac.,
prezidanto de IKUE.

'ESPERO KATOLIKA' EN NOVA VESTO

La enormaj plikariĝo de l'papero kaj plialtigo de la salajroj, k.t.p. dum la pasinta jaro kaŭzas, ke la eldonado de presita revuo estas nuntempe multekosta entrepreno. Des pli ĉar ni tute ne scias kiam heliĝos tiuj ĉi ombroj. Pro tio la administra estraro de IKUE, interkonsiliĝe kun la redaktoro, decidis plisimpligi la tipografian eksteron de EK, per tio evitante plialtigon de la abonprezo.

Ni konscias ke tiu ĉi aranĝo signifas pli malpli paŝon malantaŭen. Vi tamen pripensu ke la cirkonstancoj devigas nin elekti alian vojon por forigi la embarasojn.

Garantiante al vi ke ni per streĝiĝo de ĉiuj niaj fortoj klopodos kiel eble plej baldaŭ nuligi tiun ĉi decidon, ni faras apelon al vi havi ĝustan komprenon pri la malfacila situacio en kiu ni troviĝas.

Vi ĉiuj restu fidelaj al nia organizo kaj ĝia revuo.

A. Beckers
L. G. C. de Jong
A. F. Leideritz

B A B U S C H K A

MALNOVA RUSA LEGENDO.

Iun vesperon kiam neĝis - nun jam antaŭ pli ol cent jaroj - Babuschka estis balaanta sian dometon. Neniu en la vilaĝo povis tiel bone mastrumi kiel ŝi. Kaj kvankam ŝi vivis tre solece, ŝia dometo estis purega kiel tutnova monero. Eĉ dumvintre kreskis floroj sur ŝia fenestrojlo. La kolorigitaj muroj estis ankoraŭ same gajaj ol kiam la farbo estis malseka; ŝia skulptita pordo, ŝiaj skulptitaj lito kaj seĝetoj estis cirataj kaj polurataj ĝis ili brilis kiel la mola atlaso de princa robo. De la mateno ĝis mallumiĝo, Babuschka estis laboranta en sia dometo kaj pro tio estis tute ne mirige ke ŝi ankoraŭ estis balaanta en la malfrua vespero.

Kiam ŝi estis preta ŝi malfermis la pordon por forbalai la neĝon de l'sojlo. Klare lumis la luno, la neĝo amasiĝis kiel arĝento kaj la glacio de la rivero briletis kiel perlaro de fulmetantaj kristaloj. Akre blovis la vento, tranĉis la per pelto tegitan jupon de Babuschka kaj froste rigidigis ŝiajn orelojn kaj nazon.


Subite tamen plivarmiĝis la vento, kiu ŝajne fariĝis printempa brizo, plena je delikataj odoroj.

'Kio estas tio?' sin demandis Babuschka. 'De kie tio venas?'

Ŝi direktis la okulojn al la vojo. Jen en la brilanta lunlumo proksimiĝis la plej bela procesio kiun ŝi iam estis vidinta. Unue venis antaŭrajdanto sur stranga ĝiba besto kun longaj kruroj. Poste ŝi aŭdis ke tio estas kamelo. La antaŭrajdanto portis longan kurban glavon. Liamantelo estis ruĝa. Silente li proksimiĝis; la hufoj de lia besto, envolvitaj en felto, faris nenian bruon. Lin sekvis senfina rajdantaro; ĉiuj portis fremdan armilaron, kiu devenis de la oriento. Ĉiun el ili sekvis servisto, portante torĉon, kies ardo neklare flamis en la lunlumo. La hufoj de la ĉevaloj enfalis profunde en la neĝon.

Ankaŭ ili ne faris bruon.

Post la rajdanto venis ĉaroj plenplenaj de ĉiuspecaj homoj. Iliaj vestaĵoj estis same multkoloraj kaj abundaj kiel tiuj de ciganoj, kvankam ili portis silkajn kaj brokatajn ŝtofojn kaj ne ĉifonojn. Ili havis rugŝtritaĵojn kaj dense teksitajn tapiŝojn, ili posedis potojn el kupro kaj latuno, garnitajn per arĝento; arĝentajn telerojn kaj pokalojn, ornamitajn per juveloj. Ĉio ĉi tio brilis, lumis kaj radiis. Babuschka apenaŭ povis kredi al siaj mirigitaj okuloj. La procesio venis pli proksime. Ĉaro post ĉaro senbrue moviĝis tra la profunda neĝo. Ĉe la fino rajdis tri viroj, la plej belaj kiujn ŝi iam estis alrigardinta.



Unu el ili estis malgranda kaj maljuna; gri-
zaj haroj elvenis de sub lia turbano, sed liaj
okuloj aspektis june, tiom esperplene ili ri-
gardis antaŭen. De la kapo ĝis la piedoj li
estis vestita en oro, la koloro de la levi-
ĝanta suno. La dua estis iom pli granda kaj
juna; liaj okuloj fajreris liaj haroj estis
krispaj kaj li estis vestita en kostumo kiu
posedis la kolorojn de la vespero: violo kaj
purpuro.

Jen la tria. Neniam antaŭe Babuschka estis
vidinta viron, tiom altkreskan.

Lia vizaĝo estis tiel bela, ke ŝajnis ke ĝi
estis ĉizita laŭ malnova monero: lia haŭto
estis nigra. Li estis Etiopo. Li vestis sin per
la koloro de la tagmeza suno: skarlato.

La unua el la tri havis oron en sia manoj:
la dua kaj la tria portis kestetojn, el kiuj
leviĝis la varmaj, agrablaj odoroj, kiujn Ba-
buschka unue estis flarinta.

Babuschka fiksis siajn okulojn sur la tri viroj. Unue ili ne ŝin rimarkis.
La Etiopo montris al la ĉielo: la aliaj rigardis en tiun direkton.

Ankaŭ Babuschka. Tuj super la tri viroj staris stelo. Ĝia lumo estis tiel
klara kaj forta, ke ĝi blindigis la okulojn de Babuschka. Eĉ la luno aspek-
tis pale kompare kun la mirindaj radioj, kiuj fluis malsupren. La unua viro
faris signalon kaj la tuta procesio haltis. Tuj la stelo staris senmove su-
per ili. La dua viro parolis:

‘Ĉu ankaŭ vi rigardas al la stelo?’

Babuschka estis tiom konfuziginta ke ŝi nur povis ĝentile riverenci.

‘Ĝi kondukas nin al la Reĝo’ diris la unua.

‘Ĉu vi volas iri kun ni?’ demandis la Etiopo. ‘Sendanĝere ni akompanos vin
al nia Sinjoro kaj vi alrigardos Lin.’

Babuschka ekvidis sian balailon. Subite, por la daŭro de nur unu frazo, ŝi
ree kapablis eldiri kelkajn vortojn.

‘O ne, sinjoro! Dankon, sinjoro! Mi ne povas forlasi mian domon. Mi ja bezon-
as tutan tagon por balai kaj purigi ĝin.’

La tria kompate ŝin rigardis: la unua signalis. Senbrue la procesio plumovi-
ĝis tra la neĝo. Babuschka restis staranta kaj atendis ĝis la lasta lumanta
juvelo estis malaperinta.

Kiam ŝi ekvekiĝis la sekvan matenon, ŝi unue opiniis esti songinta.

La potencaj reĝoj ne estas venintaj; kompreneble ŝi ne estas rifuzinta iri
kun ili. Kiel eble plej baldaŭ ŝi saltis el la ŝtelo.

Troviĝis iom da cindro sur la planko antaŭ la fajrujo. Babuschka serĉis sian
balailon. Ne, ĝi ne staris en la angulo, nek en la ŝranko aŭ malantaŭ la
forno. Kie estis ŝia balailo? Tiam ŝi ekmemoris: ŝi estis balaanta la soj-
lon, kiam la tri reĝoj... kiam la songo venis. Ŝi malfermis la pordon. Jen
ŝia balailo, preskaŭ kovrita sub la neĝo, kiu estis falinta tiun nokton. Ĉiuj

paŝoj kaj ĉarospuroj ne plu estis videblaj, sed jen ŝia balailo. Babuschka eniris. Kiel dolĉe odoris ŝia dometo. Kaj la kaŭzo? Estis Babuschka mem. La reĝo el Etiopujo estis faliginta iom da mirho altvalora sur ŝian manikon. Jen ŝi estis lasinta sian balailon. Ŝi ankoraŭ havis tiun delikatan odoron sur si. Ili vere estis venintaj kaj foririntaj. Tiu penso kvazaŭ frenezigis Babuschka. Ili estis ekirintaj por viziti la Reĝon. Ŝi rapide, ŝi sekvu ilin ŝi klopodu atingi ilin. Sian tutan vivon ŝi serĉu, ĝis ŝi trovos la Reĝon. Babuschka terenjetis sian balailon kaj kovris sin per sia kapuĉmantelo. Ŝi eĉ ne volis perdi la tempon por surmeti siajn botojn, sed kuregis eksteren.

La tagoj pasis kaj la jaroj. Babuschka serĉadis en eksciteco. Ŝia malhela hararo iĝis griza, poste blanka. Ŝia dometo duonpleniĝis jeneĝo. Kiam ŝi forkuris, la pordo restis nefermita same ofte kiel fermita. La farbo iĝis malbrila, la mebloj kadukiĝis en la anguloj troviĝis dikaj araneaĵoj kaj la fajrujo estis plena je cindro. Babuschka serĉis kaj serĉis kaj serĉis..... Iun tagon ŝi renkontis viron, kiu rakontis al ŝi ke la tri viroj el la oriento estas atingintaj sian celon kaj tiam baldaŭ foririntaj. Ili estas trovintaj la Reĝon Infanon, kiu estas naskiĝinta en stalo. Volvita en tukoj ĝi estas kuŝinta en manĝujo. Kiam Babuschka aŭdis ke la Reĝo estas infano ŝia koro doloris. Ĝi preskaŭ rompiĝis tiel ĝi sopiris vidi tiun ĉi Infanon.

‘Me devas trovi Lin. Me devas serĉadi Lin.’ Ŝi rapidis pli kaj pli malproksime, kilometron post kilometro. Kie ajn ŝi vidis infanon, ŝi longe rigardis ĝin en la okulojn. Sian ŝparmonon ŝi elspezis por ludiloj kaj frandaĵoj por la infanoj.

Iam Babuschka renkontis vojaĝanton, kiu rakontis al ŝi ke la Reĝo jam antaŭ longa tempo mortis kiel viro sur krucarbo.

Aŭdinte tion ŝi ekploris pro ĉagreno. La Infano estis fariĝinta viro la Infano vivis ne plu, neniam ŝi trovas la Reĝon. Sed baldaŭ ŝi grandparte forgesis tion. Ĉiam pli klare ŝi rememoris la longan, brilantan procesion de la tri viroj kaj pli arda fariĝis ŝia sopiro al la Infano, kiun ŝi serĉis.

En kaj eksterdome, sur vojoj kaj stratoj, en kasteloj kabanoj, farmbienoj, en gastejoj kaj en staloj serĉis la maljunulino, rapide kaj silente. Kiam la infanoj ŝin vidis, ili ekĝojis. Subite ĉie odoris dolĉe kaj agrable.

Plejmulte ili tamen amis la ludilojn, kiujn ŝi postlasis; ili gardis ilin por siaj infanoj kaj siaj genepoj.

Babuschka serĉadas ĉiam. Bruo sur la ŝtuparo, rideto de bebo, donaco ĉe la fajrujo.

‘O’, kantas la infanoj ĝojplene ‘Babuschka serĉas la Reĝon, ŝi serĉadas. Sed jen, kiajn donacojn ŝi postlasis por ni.’

En ĉiu domo en Rusujo, kie la geknaboj ricevas donacojn okaze de Kristnasko, estas Babuschka, kiu ilin donis. Babuschka, kiu serĉas kaj serĉas kaj serĉas... kaj serĉadas.....

(Laŭ: ‘Sursum Corda’).

K. Gibson

LA KOREA POPOLO

Ne ekzistas nuntempe sur la tero iu popolo tiel turmentata de spiritakaj materia mizeroj kiel la enloĝantoj de la duoninsulo Koreo.

Iom post iom la popolnombro malpliigis, la lando ŝanĝiĝas en dezerto, la nacia ekonomio ruiniĝas.

Pro la malfavora geografia pozicio la 25 ĝis 30 milionoj da Koreanoj estas enkarceritaj kvazaŭ en kâgo, sen iu ŝanco de forkuro. Evakuado ne estas ebla kaj krome oni ne povas malhavi la laborfortojn.

La pli granda parto de la Koreanoj estas pagana. Ni do pli profunde kompatu ilin, ĉar ili ne havas la konsolon de la kristana koncepto pri la suferado.

Aliflanke oni devas admiri la persistan vivovolon de ĉi tiu popolo, la energion kiun ili montras per ĉiama reveno post ĉiama rifuĝo kaj la rekonstruadon de la ruinaĵoj.

Ankaŭ la ĉefurbo Seul spertis tion. Je iu momento tiu urbo enhavis ankoraŭ nur 35.000 el la iamaj 1.200.000 enloĝantoj. Post la rekaptado de la urbo de la amerikanoj multaj revenis kaj la enloĝantaro kreskis ĝis 800.000.

Per miriga eltrovemo ĉiu klopodis kapti la vivnecesajojn, ofte tamen sen atentigi la honestecon. Tie do ankaŭ la sama malmoraliga influo de la milito, kiun oni povis konstati en Okcident-Eŭropo.

La korea popolo spertis terurajn sortobatojn dum la 18 monatoj da milito. Ambaŭflanke de la fronto mortis pli ol unu miliono da Koreanoj sur la batalkampoj. Laŭtakse mortis 2 aŭ 3 milionoj el la 10 milionoj da rifuĝintoj. Ili trinkis la malpuran akvon de la rizkampoj, ili manĝis herbon multaj mort frostiĝis en la vintro de 1951a, kiam la temperaturo estis 20 gradoj sub la frostopunkto senesperaj patrinoj jetis siajn ĵusnaskiĝintajn infanojn en la stratdefluejojn kaj neniu protestis, infektaj malsanoj regis kaj medikamentoj ne estis haveblaj.

Laŭ sudkorea regna oficisto 50-60 % de la infanoj mortis. Ni ne povas kontroli tiujn ciferojn sed sendube ili estas teruraj. Tre ofte la amerikaj trupoj kunprenis dekojn el tiuj infanoj, kiujn ili trovis dumvoje. Armea ordono decidis ke tiuj infanoj estu sendotaj al orfejoj kaj multaj amerikaj soldatoj noblanime prizorgis la subtenon de siaj 'mascots'.

Kanada misirevuo antaŭ nelonge skribis super artikolo pri Koreo la plensignifan frazon: Koreo viktimo de la mondo. Kaj ni devas konfirmi ke Koreo certe nun estas foroferata por savi la mondpacon.

Tiu mondpacon estas certe tre granda bonaĵo kaj se la militantaj partioj pro la cirkonstancoj kontraŭvole kaŭzas la pereon de iu popolo, oni ne povas kulpiĝi ilin pri intenca uzado de pereiga rimedo por bona celo.

Estas certe ke Rusujo preparis kaj ekkomencigis ĉi tiun militon. Ĝi portas pro tio la teruran respondecon, antaŭ Dio kaj la historio. Sed ĉu la alia partio ne havas ian respondecon? Ĉu post la lasta milito ilia politika sinteno estis nur subtenata de puraj moralaj principoj? Ofte oni devas serĉi la kunrespondecon por iu okazantaĵo pli frue en la historio. Tiuokaze ĝi estas la lasta ĉenero de ĉenreago kaŭzita de antaŭaj eraroj.

La komunismo ankaŭ estas nur fenomeno de grava malsano inter la homoj. Koreo estas la viktimo de mondo kiu morale elrejligis. Ni nur atente legu kion la londona Catholic Herald de la 20a de septembro 1951a skribis

Estas absolute malĝuste opinii ke Koreo estas la proludaĵo de la batalantaj partioj. Ilia vera celo ja estas gajni potencajn poziciojn en mondo plena de streĉoj kaj konfliktoj. Post multmonata suferado tiu popolo nun sidas laŭlonge de la vojo, ne sciante ĉu ĝi estas savota aŭ buĉota. Sed ili estas homoj kiel ni. Kaj civilizita mondo ŝajnas esti alveninta sur punkto kie ĝi eblas toleri sen plu tian teruran situacion. Ni ankaŭ ne kulpigu la kontraŭulon. La malbono estas io, kio malmoraligas ĉiujn, kiuj venas sub ĝia influo. En la nuna situacio, kiu ŝajnas preskaŭ simbolo de la stato de la mondo, la devo de tiuj, kiuj plej laŭte kriadas por justeco kaj boneco, estas enkonduki novan iniciaton sur plej alta nivelo por savi la korean popolon. Ekzistas nenia garantiaĵo ke tiaj klopodoj efektive savos ilin de pli longa agonio. Sed neniam ni rajtas rifuzi kunlaboron al tia klopodo. Estas absolute necese ke nova, energia provo estu enkondukata.

Estas strange kaj samtempe malĝojige, ke la sorto de Koreo nur interesas okcident-eŭropajn homojn, kiam ĝi ligas la kontraŭulon kaj helpas retenigi la Ruĝulojn. Sed ĉu tio estas bona? Ĉu iu Kristano povas esti kontenta kiam la bonstato de la mondo kaj la vivo de 25 milionoj el niaj fratoj estas riskataj? Kiam ni devas doni al senesperaj homoj la pacon kun Dio kaj la mondo? Ni ankoraŭ devas priparoli spiritan mizeron en Koreo neniam menciitan. Al ambaŭ flankoj de la fronto oni altrudas al tiu popolo vivoformojn, kiuj estas fremdaj al ĝia propra kulturo kaj enhavas la ecojn de la okcidenta civilizito. Kio restos el la tre profundaj kaj praaĵ vivofortoj de la ĉino-korea kulturo kun ties valoraj kaj nature bonaj elementoj? Se tio ne estas save-

bla, tiam ankaŭ ne estos eble rekonstrui Koreon per helpo de fremdaj civilizoj. Ankaŭ por la estonto de la Eklezio en Koreo estas decide ke la prafontoj el kiuj tiu popolo ĉerpis sian kulturon ne estu supersūtataj de elhejma pure teknika civilizo. Nur en harmonia agordo kun la valoraj antikvaĵoj oni povas konstrui la Kristanismon en Koreo sur solida fundamento. Tiu rekonstruo tamen ne sukcesos, se oni ne plantos la supernaturon sur natura sojlo. Kaj refalo en la iaman paganismon estus por la Koreanoj same fatala kiel la akcepto de la nova paganismo kiu bedaŭrinde venas kune kun la teknika civilizo. La deportita Apostola Delegito de Koreo, lia Moŝto Byrne, klarigis post la episkopa konsekro en 1949a al siaj diocezanoj, sian blazondevizon 'Nisi Domini' jene.

Kiam la Sinjoro ne konstruas la domon, la laboristoj konstruas vane.

'Nisi Domini' estas profetaĵo pri la absoluta malsukceso de la komunismo. Rilate al Koreo tio signifas, ke se popolo ne sin apogas sur kristana bazo, la demokracio ne estos daŭra. Tio signifas, ke ni devas eviti la erarojn de tiuj popoloj kiuj dum la lasta generacio foriris de Dio kaj akceptis la paganismon. 'Nisi Domini' havas spiritan signifon. Ĝi substrekas la valoron de la supernatura vivo.

Kiu povas doni tion al la Korea popolo ol nur la Eklezio? La neanstataŭebla tasko de la misioj ĉe la savo de Koreo el ĝia granda mizero estas priskribita per tiuj vortoj. Estas konsolo por ni katolikoj, ke, kun escepto de nur malgranda nombro, ĉiuj restis fidelaj.

Preskaŭ ĉio ruiniĝis, escepte la kredo de nia popolo diris la apostola prefekto de Ĉunĉon, kaj li daŭrigis.

La verecoj de ilia plejfirma kredo estas la sola konsolo por niaj katolikoj. Ni devas konstrui multon. Sed dank' al Dio ni havas la kredon de la popolo kiel surkonstruan bazon.

Jen kelkaj elĉerpajoj el la nederlanda revuo 'De Katholieke Missiën' verkitaj de Jos. Peters, la tradukon de kiuj ni kredas interesa por niaj legantoj, precipe ĉar ĉi tiun monaton la intenco de la 'Apostolado de la Preĝo' koncernas la korean popolon. Ni kune preĝu kun niaj milionoj da samkredanoj ke Dio kompatu tiun multsuferantan korean popolon.

G. E.

LA ATESTANTOJ DE JEHOVA

Kvankam tuj post la milito la aktiveco de ĉi tiuj novuloj estis granda, tamen ŝajnas al ni, ke la lastajn jarojn ĝi malpliigis, almenaŭ en Nederlando. Estos nur malmultaj legantoj, kiuj ankoraŭ neniam aŭdis pri ĉi tiu asocio. Pro tio estos verŝajne utile, rakonti ion pri tiu movado.

La oficiala nomo estas: Internacia unuiĝo de seriozaj Biblio-esplorantoj. Kiel serioze tamen ĉi tiuj esplorantoj agas rilate al la Biblio, montros la plua enhavo de ĉi tiu artikolo.

Ili ankaŭ kelkfoje nomiĝas Russellanoj pro sia fondinto Ch. Russell. La asocio estas ankaŭ konata kiel la Biblio- aŭ traktatasocio 'La Gardoturo' ('The Watch-tower').

Ch. Russell, Amerikano, estis Kalvinano de naskiĝo. Pro la rigoreco de la Kalvinismo li finvenis al la alia ekstremo. Li estis konvinkita, ke antaŭ li neniu ankoraŭ ĝuste legis kaj komprenis la Biblion; kaj per ĉi tioli klarigis ankaŭ la kontraŭecon inter la diversaj kristanaj eklezioj. Dio instruis al li, tiel oni diras, kompreni kaj klarigi la Biblion laŭ la sola ĝusta senco. Li kaj liaj disĉiploj do ekatestis pri la komisio, kiun Jehova (nomo de Dio el la Malnova Testamento) konfidis al li. Tiu komisio entenas: la pecon de la nuntempa kristanismo (organizacio de satano) kaj la apudan venon de miljara regno.

Kvankam la privata vivo de Russell estis malhonoriginta per la postulo al eksedziĝo fare de lia edzino pro malfideleco kaj krueleco kaj pro la akuzo pri malhonesteco, la rapida disvastiĝo de liaj ideoj ŝajnas esti interligita kun liaj nobla koro kaj sobra vivo. La plej grava tamen estas lia organi-

za talento. La ministerio de Propagando kiun li starigis, estas nuntempe eldonejo, en kiu preskaŭ unu milo da homoj laboras kaj el kiu ekz. en 1945 estis forsendataj tra la tuta mondo entute 67.454.212 ekzempleroj de diversaj verketoj. Lia postsekvanto, la amerika juĝisto Rutherford, posedis same grandan organizan talenton, sed li estis pli kruda kaj impertinenta en sia agmaniero.

La movadon nun estras certa Nathan Knorr, kiu kiel eble plej multe evitas ĉian personan publikecon.

La granda devizo de la movado estas: Ne religio, sed kristanismo! Ĉiuj religiaj organizaciøj estas eltrovoj de satano kaj pro tio ili estas la kaŭzo de milito, nutrajmanko, kapitalismo kaj malĉasteco. Kiel oni tamen devas kompreni ilian kristanismon, estas nenie dirate, escepte de la 'tezo', ke Dio prokrastis la pereigon de la homaro pro la Krucmorto de Kristo kaj donis al la homaro en miljara pacregno novan ŝancon por elekti inter eterna vivo kaj eterna pereco.

Apogante sin sur ĉiaj bibliaj ciferoj, Russell kuraĝis antaŭdiri, ke Kristo venos sur la tero en 1874 kaj ke la pacregno komenciĝos kvardek jarojn poste. Sed kvardek jarojn poste la unua mondmilito eksplodis kaj tiam oni parolis pri la lasta lukto de satano. La postsekvinto de Russell do translokis la daton al 1925; kaj laŭ la lasta antaŭdiro la mondo pereos en 1954!

Al la instruo de la atestantoj de Jehova krome apartenas i.a. ke Dio ne estas perfekta, ke Kristo ne estas Dio; ne ekzistas la S. Spirito, nek infero, nek purgatorio, nek homa animo (kaj ĉio ĉi tio laŭ 'serioza' Biblio-esploro!).

Rimarkinde estas ankaŭ, ke, kvankam la atestantoj de Jehova persiste tenas, ke la leĝo de Dio resume konsistas en la amo, ili tamen distingiĝis per nenielgebla malamo kontraŭ la Katolika Eklezio, kontraŭ la pastraro kaj la papeco. Dum proceso kontraŭ tiuj ĉi atestantoj en la kanada urbo Quebec la publika denuncanto prave rimarkigis: 'Ĉi tiuj homoj deklaras, ke estas iliaj devo kaj rajto ataki la aliajn religiojn; sed kiam ĉi tiuj aliaj defendas sin, ili ekbruegas pri netoleremo kaj persekutado.'

El tio, kion ni ĉi-supre skribis la leganto certe povas fari al si la ideon pri ĉi tiuj atestantoj de Jehova. Profesoro H. Cagne, kiu pristudis la verkojn de Russell, konkludas, ke ĉi tiuj homoj ne konsideras sian instruon kiel religion; ke ilia anaro ne formas religian sekton, kaj ke iliaj propagandistoj ne estas administrantoj de iu kulto.

El: Vojo Vero - Vivo

SUBTENANTAJ MEMBROJ

A. J. Beckers, sac.
L. G. C. de Jong
P. Golobic
L. Boel
G. Verhaegen

Overpelt (Belgujo)
Vleuten (Nederlando)
Medina (Usono)
St. Niklaas (Belgujo)
Grembergen (Belgujo)

PREMIO POR TRI NOVAJ ABONOJ

J. de Mayer, sac.

Wijchmaal (Belgujo)

INFORMOJ EL AŬSTRUJO

NEKROLOGO

La 29an de novembro 1951 mortis en la 60a vivjaro d-ro Leo B L A A S lektoro por Esperanto ĉe la universitato en Innsbruck prezidanto de la Ŝtata ekzamen komisiono por Esperanto en Innsbruck. Ankoraŭ en la aŭstria Esp. kongreso en Innsbruck kaj la Univ. kongreso kaj IKKE en München li kvankam sa nece suferanta partoprenis kaj vigle interesiĝis kaj kunagis. Riĉa estas lia verkaro parte scienca kaj literatura preta je presigo. La kara mortinto estis praktikanta katoliko kaj fidela ano de nia eklezio. R. I. P.

Tutaŭstria Katolika Kongreso (Gesamtösterreichischer Katholikentag) okazos de la 12a ĝis 14a de septembro 1952 en **Wien (Vieno)**, antaŭe resp. samtempe ankaŭ **Internacia Katolika Junulara Kongreso**.

Gejunuloj partoprenontoj tiun kongreson, propagandu por Esperanto tiuokaze esperantista junularo, interesiĝu por la afero, varbu por Esperanto! **Katolikaj esperantistoj de Vieno** intencas, en la kadro de la nomita Katholikentag aranĝi Di-servon solenan kaj festkunvenon, eventuale laborkunsidon! Katolikaj gesamcelanoj, kiuj intencas veni al tiu kvankam unuavice landa aranĝo, plej baldaŭ anoncu sin. Estus bonega instigo por nia afero kaj pruvo al la katolika publiko, se per Esperanto montriĝus **i n t e r n a c i a** karaktero de la aranĝo! Detaloj sekvos. Informojn donas.

W. Mudrak Wien III, Beatrixg. 19 (aldonu respondkuponon!)

Inaŭguro de Zamenhof-monumento okazos la 27an de julio en **Wörgl**, la plej nova urbo de Aŭstrujo, en la bela liglando **T i r o l**, 60 km oriente de Innsbruck. Al la honora komitato apartenas: ĉefepiskopo kardinalo d-ro Theodor Innitzer, Wien, kaj ĉefepiskopo d-ro Andreas Rohrer, Salzburg. La aŭstria federacia kanceliero inĝ. d-ro h.c. Leopold Figl estas protektanto de la monumenta komitato. Informojn donas. s-ano Hans Steiner, Wörgl, Augasse 42, Tirolo, Aŭstrujo.

La Aŭstria Katolika Ligo Esperantista (AKLE) aranĝis en la kadro de AEF (Aŭstria Esp. Federacio), Wien, adventmediton kaj Kristnaskofesteton kun multnombraj partoprenantoj, plue je la 3a adventdimanĉo posttagmezan Di-servon. Malgraŭ pluvego kaj antaŭkristnaskaj preparoj la samideanaro venis multnombre. Pastro komandoro G. Plank predikis edife pri la advento.

Ĝenerala Viena Esperanto-tago okazis la 6an de oktobro 1951, dum kiu oni prezentis raportojn pri la Esp.-kongresoj. S-ano Mudrak raportis pri la XXIIIa Intern. kongreso de katolikaj esperantistoj en München. Raportis pri la kongreso en München resp. pri la katolika Esperanto-afero i.a. 'Wiener Kirchenblatt', Wien, 'Kalasantiner Blätter' (katolika socia monata gazeto), Wien, 'Der Weg' (monata gazeto en la spirito de S. Francisko), k.a. Precipe 'Kalasantiner Blätter' ĉiam tre favore akceptas ankaŭ detalajn artikolojn kaj raportojn.

Grave akcidentis Kortega Kons. **Hugo Steiner**, fondinto kaj direktoro de la Internacia Esp.-Muzeo en Wien. Dank' al Dio, li jam troviĝas sur la bona vojo al resaniĝo kaj volas denove baldaŭ aktive daŭrigi sian laboradon en la muzeo. **Sanecon** kaj benon ni deziras.

W. M.

Boekhandel-Offsetdrukkerij "Elinkwijk"
Amsterdamsestraatweg 480-482
Utrecht Telefoon 10757